Informilo de Semptembro 2014

Universala Kongreso aprobis rezolucion pri lingvo kaj daŭripova evoluo

Ne egalecoj de lingvo, kaj voĉoj silentigitaj pro lingvaj diferencoj ricevis grandan emfazon en la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, en Bonaero en aŭgusto. La Kongreso aprobis rezolucion, kiu markis la finon de la Jardeko de Edukado pri Daŭripova Evoluo, kun jena teksto:

Ni, 706 partoprenantoj en la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 57 landoj de chiuj mondopartoj al Bonaero, Argentino,

Diskutinte en pluraj sesioj pri la temo “Chu la nepoj nin benos? Streboj al dauripova estonteco”;

Konstatinte,

ke Esperanto reprezentas plene aktualan strebadon, kun evidentaj ligoj al aliaj esencaj agadoj kadre de la nuntempaj tutmondigaj tendencoj,

ke la celado al sanaj, dauripovaj socioj, bazitaj sur paco, justeco, demokratio kaj ekonomio servanta al la homoj kun respekto al la vivosubtenaj sistemoj de la naturo, kongruas al la interkultura solidareco kiu chiam motivis la Esperanto-movadon,

kaj ke en la diversaj aliroj al dauripovo ofte mankas suficha atento al la ligo inter la lingvaj demandoj kaj aliaj esencaj agadoj, kio donas al ni la taskon daure kaj pli efike labori tiukampe;

Alvokas

chiujn subtenantojn de Esperanto fari chion eblan por plenumi nian apartan rolon kiel movado por justa, konscia multlingvismo, kaj vicighi inter la diversaj sociaj movadoj por interkultura kaj kontraudiskriminacia edukado, homaj rajtoj, naturprotektado, popola klerigado, rimedosparaj vivstiloj kaj aliaj;

Deklaras,

ke la valoroj necesaj al la konstruado de dauripova monda socio estas kernaj valoroj de nia movado, char mondo, en kiu Esperanto daure havos sencon, estos mondo, kiu ekonomie kaj ekologie, politike kaj kulture, konservas diversecon, pacon kaj justecon.

UEA reprezentiĝis en la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj, organizita en Novjorko de la Fako de UN pri Publika Informado

Universala Esperanto-Asocio estis reprezentita de tri delegitoj en la lastatempa 65-a Konferenco de NROj organizita de la Fako de UN pri Publika Informado: Prof. Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj; Neil Blonstein, direktoro de la Novjorka Oficejo de UEA; kaj Young-Long Kim (Korea Respubliko). Pli ol 2000 reprezentantoj el 117 landoj ĉeestis. La celo de la konferenco estis evoluigi laborprogramon por NROj por la periodo post la jaro 2015. Rondaj tabloj kaj atelieroj traktis abundajn esencajn demandojn de la venonta jardeko – periodo en kiu oni anstataŭigos la finiĝantajn Jarmilajn Evoluigajn Celojn per nova aro de Celoj por Daŭripova Evoluo, nuntempe diskutataj de NROj kaj la membro-ŝtatoj de UN. Demandoj kiel klimata ŝanĝiĝo, sano, la rolo de amasmedioj, kaj homaj rajtoj formis signifan parton de la programo. Alia grava temo de diskutado estis la fakto, ke multaj homoj en la evolulandoj restas ekskluzivita el partopreno en daŭripova evoluo.

Malgraŭ siaj plej fortaj klopodoj, la Asocio faris relative malmultan progreson en konvinkado de delegitoj pri la neceso konsideri lingvojn kiel dimension en tiu ekskluzivado. “Multaj voĉoj estas silentigitaj,” rimarkis Profesoro Tonkin, “ĉar iliaj lingvoj ne estas komprenataj de la gvidantoj de evoluigaj programoj, kiuj planas ilian estontecon. Ja bonas, ke nia atento transiras el produktobazita evoluigo al konsumobazitaj konsideroj, sed ĉiu homo devas havi sian sidlokon ĉe la tablo. Ni devas rekoni, ke ni ne kapablas aŭdi la multilingvajn voĉojn de la monda enloĝantaro per organizado de unulingvaj konferencoj en la komforta medio de la urbo Novjorko.” Propono de la Asocio, kun subteno de la Centro por Aplika Lingvistiko kaj la Legio de Bona Volo, inter aliaj, por sesio pri lingvaj diferencoj ne ricevis aprobon de la konferencaj organizantoj, kaj lingvaj demandoj apenaŭ menciiĝis kiel prioritatoj en la konferenca programo. La delegitaro de UEA promesis daŭrigi sian strebadon por konvinki Unuiĝintajn Naciojn plilarĝigi sian aliron al lingvaj demandoj por eviti ekskluzive desupran planadon.

Fettes: UN devas fronti lingvajn demandojn

“Analizo de farado de politiko pri daŭripova evoluigo ĉe Unuiĝintaj Nacioj montras, ke lingvaj demandoj estas malofte difinataj aŭ esplorataj en manieroj, kiuj spegulas ‘daŭripovecan pensadon’”, laŭ profesoro Mark Fettes, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĉe la Konferenco pri Multdisciplinaj Aliroj al Lingvopolitiko kaj Lingvoplanado, okazinta ĉe la Universitato de Kalgario, Kanado, la 4-an ĝis la 6-a de septembro. “Unu konsekvenco,” li aldonis, “estas, ke ne ekzistas kohera kadro por fronti lingvajn malegalecojn ene de la evoluiga procezo.” Aliaj referaĵoj en la konferenco inkluzivis konsideron de transnacia komunikado kaj ‘tutlokiĝo’ (glocalisation) de prof. Federico Gobbo, profesoro de Esperanto kaj interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo, ekzamenadon de la historia fono de Esperanto (Prof. Humphrey Tonkin, Universitato de Hartford, Usono), kaj esploradon de la fakta lingvopolitiko de la Eŭropa Komisiono (d-ro Michele Gazzola, Humboldt-Universitato, Berlino).

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041